

# ESPERANTOLEHTI



Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ kesäkuu ♦ junio ♦ 3/2017



Impresoj de la festivalo Maailma kylässä, p. 6

♦ Somera kurso – Kesäkurssi, Rauma, p. 4

♦ Eino Leino esperante, p. 5

♦ Aŭtunaj Tagoj, Syyspäivät 9.–10.9.2017, p. 8–11

♦ La socia reto Amikumu lanĉiĝis, p. 13

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.

Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

Originaj tekstojn eblas reaperigi kun indiko de la fonto.

Alkuperäiset tekstit ovat uudelleen julkaistavissa lähdemaininnan kanssa.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo:** ✉ [eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi)

Päätoimittaja/Chefredaktör/Cefredaktoro: *Robert Bogenschneider*

Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ [brilanto@gmail.com](mailto:brilanto@gmail.com)

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ [maj-lis@maisanpaja.info](mailto:maj-lis@maisanpaja.info)

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

**Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 25 €/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu la antaŭlastan paĝon

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

☎ 044 264 2742 ✉ [eaf@esperanto.fi](mailto:eaf@esperanto.fi)

**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmogatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

**Pankkitili/Bankkonto:** FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

**Julkaisija/Utgivare/Eldonanto:** Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

**Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto:** 300

**Kansi/Pärm/Kovrile:** Dejoras Paula kaj Tomaso. / Paula ja Tuomo päivystysvuorossa.

Foto/Kuva: *Miamaria Saastamoinen*

## Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 ✉ [eafprezidanto@esperanto.fi](mailto:eafprezidanto@esperanto.fi)

**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ [paivi.saarinen@iki.fi](mailto:paivi.saarinen@iki.fi)

**Sekretario/Sihteerii/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ 050 549 4709 ✉ [eafsekretario@esperanto.fi](mailto:eafsekretario@esperanto.fi)

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**

*Robert Bogenschneider*, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ [brilanto@gmail.com](mailto:brilanto@gmail.com)

*Tiina Kosunen*, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ [tiina.kosunen945@gmail.com](mailto:tiina.kosunen945@gmail.com)

*Arja Kухanen*, Saratie 2, 31300 Tammela. ✉ [kuhanenarja@gmail.com](mailto:kuhanenarja@gmail.com)

*Paula Niinikorpi*, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ [paula.niinikorpi@gmail.com](mailto:paula.niinikorpi@gmail.com)

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**

*Tapani Aarne*, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 524 5823 ✉ [tapani.aarne@mbnet.fi](mailto:tapani.aarne@mbnet.fi)

*Börje Eriksson*, Kulmakatu 10 A 6, 15140 Lahti. ☎ 040 779 3487 ✉ [bovoeo73@gmail.com](mailto:bovoeo73@gmail.com)

*Miamaria Saastamoinen*, ☎ 050 32 89 612 ✉ [miamaria.saastamoinen@gmail.com](mailto:miamaria.saastamoinen@gmail.com)

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ [eafkasisto@esperanto.fi](mailto:eafkasisto@esperanto.fi)

**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:** FI44 5630 4550 0426 25 OKOYFIHH

(UEA/EAF Paula Niinikorpi) Adreson vidu supre. / Katso osoite ylhäältä.

**Oficejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.

☎ 044 264 2742 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marse 17–19-a horo ✉ [eaf@esperanto.fi](mailto:eaf@esperanto.fi)

**Internet:** [www.esperanto.fi](http://www.esperanto.fi) ♦ [www.facebook.com/Finnlando](http://www.facebook.com/Finnlando) ♦ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/finnlando

## Pezas, lamas, krizas?

**L**a Finnlanda registaro estis relative facile fondita antaŭ du jaroj – almenaŭ se kompari kun 2011 – sed ĝia paŝado estas peza, aŭ lama. En junio okazis en ĝia parlamenta apogo ŝanĝoj, kiuj certe ne malkomplikigas la staton.

En la dua juna semajnfino kongresis tiu el la tri registaraj partioj, kiu nomas sin ”Veraj Finnoj”. Ĝi bonege sukcesis en la parlamentaj balotoj en 2011 (39 seĝoj el 200, gajno de 34) kaj 2015 (38 seĝoj, perdo de 1) dank’al populisma propagando kontraŭ ”multkulturismo”, por konservativaj sociaj valoroj kaj pri malkapablo de pli establita politikaj agantoj ordigi la ekonomion. En 2011 la ”veraj” restis ekster la sespartia registaro (mal- kaj refondita en 2014), sed en 2015 estis fondita ”burĝa” registaro de tri partioj, la centra (49 seĝoj), la ”veraj” (38) kaj la konservativa (37). La koalicio apogata de 124 parlamentanoj renkontis sukcesojn kun sia programo, ekzemple malaltigi salajran realenspezon, sed ankaŭ malvenkojn: ĝi devis retiri leĝproponojn ekzemple pri privatigo de ŝtataj funkcioj pro tio ke la proponoj ne obeis la konstitucion.

La prezidanto de la ”veraj” dum 20 jaroj, *Timo Soini*, anoncis sian retiriĝon jam komence de marto. Li ankaŭ anoncis sian pretecon kaj volon daŭrigi kiel registara ministro pri eksterlandaj aferoj (estas nekutime, ke grava ministro ne estas partigvidanto). Entute la partio okupas kvin el la 17 ministraj postenoj.

La kongreso elektis kiel novan prezidanton *Jussi Halla-aho* (parlamentano 2011–14, membro de Eŭropa parlamento ekde 2014) ne unuanime, sed per surprize granda plimulto: 949 voĉoj, dum ministro pri kulturo, sporto kaj Eŭropaj aferoj *Sampo Terho* malgajnis kun 629 voĉoj.

La grandecon de la ciferoj – kaj, almenaŭ parte, la rezulton – eksplikas tio, ke la balotrajto en la kongreso estas individua: ĉiu membro estas plenrajta partoprenanto. Abruptaj ŝanĝoj pli facilas ol en normala strukturo kun reprezentantoj

de lokaj kaj distrik-taj organizaĵoj. Des pli, kiam la eksprezidanto kaj fondinto de la partio (Soini) dum dudek jaroj estis absoluta gvidanto, ĉiam sen rivalo unuanime reelektita.

Halla-aho estas konata kiel gvidanto de la plej nacionalisma alo de sia partio. Kontraŭliberalismo, malaprobo de enmigraĉo, aparte allaso de rifuĝintoj, religia netolero, postulo ekŝigi el Eŭropa Unio estas ties komunaj. La lingvopolitika starpunkto estas nuligo de la Finnlanda dulingvismo. – Li mem estis en 2012 verdiktita je monpuno pro provokado al krimagoj kontraŭ homoj pro ilia religia kaj etna aparteneco. Niaj eksterlandaj amikoj referencu ekzemple al la Franca FN, Dana DF, ”Svedio-demokratoj”, Brita Ukip, Hungara Jobbik k.s. por orientiĝi pri ideologiaj deirpunktoj de la alo kaptinta la ”verajn”; ankaŭ la tri novelektitaj vicprezidantoj estas samlinianoj.

Tuj post la kongreso la ĉefministro eldiris, ke la registaro ekŝigas. Tiam subite atingis lin la informo, ke dudek ”verfinnaj” parlamentanoj, inkluzive la ministrojn, fondis novan parlamentan grupon (poste alinominta sin ”Blua Estonteco”). La ĉefministro sciigis, ke la registaro tamen daŭrigas, nun apogata de 105 parlamentanoj. Estis novtipa kaj unika spektaklo.

Finnlando estas plenrajta respubliko de cent jaroj. Dum nia jarcento ne mankis riskoj, minacoj tiel eksteraj kiel internaj kontraŭ nia homrespektaj valoroj de demokratio kaj egalrajteco, de reciproka prizorgo de ”ĉiuj filoj de la lando” por laŭi Zamenhofan difinon; tiuj estis renkontitaj kaj venkitaj. Ni esperas kaj certas, ke la sekva jarcento simile sukcesas.



*Tuomo Grundström*



Grupfoto antaŭ la kursejo. Fotis pasanto.

## Somera kurso – Kesäkurssi, Rauma 15.–18.6.2017

La somera kurso en Rauma okazis en bonhumora kaj bela etoso kun 10 kursanoj, 2 instruistoj kaj 2 kursoaranĝantoj. La instruistoj, *Magdaléna Fejfičová (Fejfi)* kaj *Sylvia Hämmäläinen*, gvidis parte ambaŭ grupojn, sed Fejfi koncentriĝis pli al la diskutgrupo kaj Sylvia al la elementa kaj ripetanta grupoj. *Tuomo Grundström* kaj *Tiina Oittinen* zorgis pri praktikajtoj en la kursejo kaj dum la vizitoj en diversaj lokoj de la apuda malnova Rauma.

La kursejo, *Vanha kansalaisopisto (Malnova civitana instituto)*, estis ideala loko por la kurso: estis sufiĉe da spaco por ĉiuj aktivajtoj, sed la domo estis samtempe hejmeca. En la unua kursotago, ĵaŭde, la kurson vizitis redaktoro kun fotisto de la loka gazeto *Raumalainen* kaj sabate aperis bela, informa artikolo en ĝi. Eble tio allogis vizitanton al la kurso, ĉiuokaze sabate la elementa grupo havis unu plian kursanon, kiu kun granda intereso sekvis kaj partoprenis la lecionojn.

Vendrede estis invitita loka ĉiĉerono, *Teija Rantapero*, kiu kun loka dialekto (*rauman giäl*), rakontis multflanke pri la urbo. Iam kaj tiam Tuomo petis, ke la kursanoj pensu kiel diri aferojn esperante kaj plej ofte la konvena esprimo estis trovita tre rapide. Vizitoj en ĉefaj vidindaĵoj, en la apuda mezepoka preĝejo kaj en la urbaj muzeoj okazis vendrede kaj sabate. Tagmeze la kursanoj lunĉis en etaj grupoj, en la malnova urbo ja abundas ebloj. Vespere ili ĝuis kune vespermanĝon kaj amuziĝis diskutante.

Eĉ la vetero estis favora dum la kursotagoj, nek tro varma nek pluva. Jen la pli-malpli oficiala raporteto de la kurso, en la septembra Esperantolehti aperos pliaj impresoj kaj spertoj de la partoprenantoj.

Bonan someron al ĉiuj!

*Raportis*  
*Tiina Oittinen*

# Eino Leino esperante

*Eino Leino* (6.7.1878–10.1.1926) estas ofte nomata la lirikisto de Finnlando. Festu la Tagon de Poezio kaj Somero la sesan de julio!

Estas indikitaj tradukintoj kaj kiam-kie esperante ili aperis; tiuj sen indiko estas miaj, ne presitaj.

*Tomas'*

## LEGENDO

Rakonto diras, ke Savanto foje kun Petro estis tra la mond' survoje kaj, transe larĝa spac' de akvo, tero, atingis Suomi en somervespero. Eksidis ili kune sub betulo, sur klina bordo de duoninsulo, interparolis multe kiel ĉiam, sed sankta Petro diris moke tiam: Jen, Majstro, lando! Stranga mondangulo! La homo preskaŭ muta, dorskurbulo! Kaj vidi rokojn! Malfeliĉa tero! El ĝi apenaŭ kreskos fungo, bero! Ridetis Dio je prijuĝo moka; Jes, diris, grundo estas tute roka. Por fruktoj, grenoj varmo ne sufiĉa, sed homa koro estas varma, riĉa. Dirinte tiujn vortojn Li ridetis. De Li rideto sin sur akvojn metis: sekiĝis marĉoj kaj el nub' irante la suno longe brilis ridetante. Ekstaris ili kaj daŭrigis vojon, sed oni diras, ke eĉ nun multfoje, se sub betulo sidas vi vespere, rideton vidas vi ĉielan tere.

*Trad. G. J. Ramstedt (EF julio 1920)*

## LA KANTO DE MIRJAMI

Flor' kliniĝas al frata flor',  
hom' kliniĝas al homa kor'.  
Kien kliniĝu mi, ho Mirjami kara,  
kie 'stas vi, floro rara?  
Tag' subiris malantaŭ mont',  
Ĉio perlas ĝis horizont'.  
Lumas kaj brilas la tuta tero.  
Kie 'stas mia orero??  
Kie restas la koramat'?  
Kie 'stas via blankĉeval'?  
Hastu en mian sinon ulmarian  
aŭ ĉu vi trovis alian?

*Trad. Börje Holmberg (EF 3/1982)*

## KANTO PRI FELIĈO (Laulu onnesta)

Feliĉon kiu trovis, gardu sin,  
trezoron kiu trovis, kovru ĝin  
kaj la feliĉon vartu en la kor'  
kaj ĝoju sola en privata for'.  
Feliĉo ne toleras esti en  
vilaĝo, sed ĝi volas resti en  
kvieta paco, en rifuĝa dom'  
kaj tie ĝoji kun la kara hom'.

## POMFLOROJ (Omenankukat)

Lumas al mi la pomarbakron'  
burĝona en nokto luna.  
Ĝi blankas ĉe l' rand' de arbara fon';  
kaj revas fraŭlino juna.  
La noktoj malmultaj en printemp',  
la noktoj de altaj profundoj!  
Se restas trunkvila la nokta vent',  
maturas aŭtune fruktoj.  
Ĉielo, ne ŝtormon sendu vi  
al la ĝardeno floranta!  
Protektu, ho kara mia Di'  
pomarbron de l' orf' ploranta.

## MARO SUB LUNO (Meri kuutamolla)

Mi min sentas strange, kvazaŭ mar'  
sub luno rebrilanta.  
Ne volas mi esti inter ar',  
sola restas mi sopiranta.  
Mi min sentas alta, kvazaŭ la stel'  
rigardas mia okulo  
vidanta la tutan mondon el  
la alto de suno kaj luno.  
Ho kara patrino, se vivus vi,  
sub via protekto mi plorus!  
Vi konsolus kaj pardonus pri  
la misvojaj, vivĝojon redonus.  
Homaro, ho kial malicon vi  
toleras, kaj fratpersekuton  
en tiu ĉi mondo de bona Di'  
kreita en belan tuton?  
Homaro, ho kial vi en malĝaj'  
vagadas sub alta ĉielo?  
Amikoj, rigardu al supro, kaj  
kuniĝos vi en lunhelo!  
Ne volas mi esti inter ar',  
sola restas mi sopiranta.  
Mi sentas min strange, kvazaŭ mar'  
sub luno rebrilanta.

## ARBARE MI PAŜAS PADON

(Minä metsän polkuja kuljen)  
Arbare mi paŝas padon,  
sommemokto ĉirkaŭas min;  
el brusto plenplena de ĝoju  
mi nur kantas kaj kantas sen fin'.  
En bosko ĉe montpiedo  
ĵus lasita, miraklon mi  
ekkvivis, sentis teneron  
sub verdo de arbfoli'.  
Tion nur feliĉulo, mi, scias,  
mi nur kaj nur unu ali'.  
Sed vidis tion birdeto  
kaj florodora til'.

## FOJE MI SONGĜIS SOMERON

(Näin unta kesästä kerran)  
Foje mi songĝis someron,  
kiel brilis dia suno.  
lumis mian, lumis ĉian,  
eĉ kabanon malriĉulan;  
verde brilis mil betuloj,  
blue brilis cent' da lagoj,  
ĝojis floroj sur herbejo,  
kantis kverkoj en arbarto;  
arb' rakontis, flor' aŭskultis, -  
aŭdis la povrul' kaj kredis.  
Kredis, ke l' somero volis  
ankaŭ al la malriĉulo  
doni dolĉon de sunvarmo,  
lasi aŭdi birdotrilon. –  
Jen ekblovis frida vento,  
en arbarto lup' ekhurilis,  
el ĉielo neĝ' blovdadis,  
el vilaĝo voĉ' glacia.  
Duafoje mi neniam  
songĝis pri brila somero.





Paula kaj Miamaria dejas. Foto: TG

## Impresoj de la festivalo Maailma kylässä

Ankaŭ ĉi-jare FEJO havis lokon en la festivalo *Maailma kylässä*, kiu okazis dum la semajnfino 27.–28.5.2017 en *Rautatienori* kaj *Kaisaniemen puisto* en Helsinko.

Inter preskaŭ 400 aliaj ekspoziciantoj ni informis pri Esperanto al amaso da vizitantoj. Suna vetero kaj leĝera etoso kun interesa programo allogis al la festivalo proksimume 78 mil vizitantojn, el kiuj iuj haltis ankaŭ ĉe nia tablo. Kelkaj jam konis Esperanton pro parencoj aŭ pro propra iama lernado. Iuj estis eble pli skeptikaj pri la afero, sed tamen kun intereso diskutis pri lingvaj temoj. Kelkaj tute ne sciis pri Esperanto, kaj do povis ricevi la unuan impulson por ebla posta lernado.

Sur nia tablo estis varia kolekto da libroj, gaze-

toj kaj muzikdiskoj en Esperanto. Aldone ni havis broŝurojn kaj informajn diskojn pri nia lingvo por disdoni al la interesitoj. Nian videblecon multe plibonigis ĉi-jare la freŝe havigita rulreklamo (*“roll up-stando”*), kiun bele desegnis *Börje Eriksson*. Ĉi tiu nova reklamilo estas utiligebla ankaŭ por aliaj okazoj. Ĝi bone taŭgas por kapti la atenton de preterpasantaj homoj.

Ĉe [www.maailmakylassa.fi](http://www.maailmakylassa.fi) troviĝas filmoj kaj fotoj por ricevi pliajn impresojn pri la pasinta aranĝo kaj ĝia etoso. Troviĝas ankaŭ informoj pri la venontjara festivalo.

Dankon al ĉiuj deĵorantoj kaj aliaj helpantoj por krei interesan partoprenon en la festivalo!

Paula Niinikorpi

# La UEA-estraro traktis renovigojn en Roterdamo

Nova membrosistemo de UEA, kunlige kun nova datumbazo kaj nova retejo, estis unu el la paŝoj al modernigo traktitaj en la Estrara kunsido en Roterdamo, de la 21-a ĝis la 24-a de aprilo. Aldone al la ses estraranoj de UEA kaj observantoj de TEJO kaj ILEI, ĉeestis tri anoj de la teknika teamo kiu realigos la novan retejon, kune kun volontulo *Pierre Vittet*, kunlaboranto pri la datumbazo. La nova sistemo integrigos la membraran, libroservan kaj retejan administradon kaj kreos sekuran ligan al aparta financa sistemo, ebligante pli kvalitajn kaj diversajn servojn al la membroj kaj ŝparante laborfortojn en la Centra Oficejo. Laŭplane la projekto efektiviĝos en malpli ol unu jaro. La enkonduko de novaj kategorioj de membreco estis prokrastita pasintjare por doni prioritaton al la sukcesa Ĝenerala Voĉdono pri la Statuto. La Estraro nun reproponos tion al la Komitato kun kelkaj modifetoj, sed la kernaj principoj restas samaj: baza membreco kostu laŭeble malmulte kaj estu proporcia al la averaĝa enspezo en la koncerna lando, kun aliro nur al retaj servoj; plena membreco enhavu plusan sumon por kovri la kostojn de eldonaĵoj kaj kongresa rabato; kaj subtena membreco inkluzivu aliĝon al Societo Zamenhof. Per tio la Estraro esperas malfermi vojon al membriĝo al la novaj generacioj kiuj kutimas al retaj servoj, samtempe daŭrigante la tradiciajn formojn de membreco kiuj kontribuas pli multe finance.

La Estraro laboras ankaŭ por pretigi novan Strategian Planon de UEA, kiu ĉi-foje estos aparta de la Laborplano kaj celos esti konciza kaj inspira. En strategia diskuto, kiu komenciĝis rete kaj pludisvolviĝis dum la Roterdama kunsido, klariĝis i.a. jenaj prioritatoj: aktivigo kaj trejnado de la membroj sur la diversaj agad-

kampoj, disvolvo de la rolo de UEA kiel movada informcentro kun granda reto de lokaj kunlaborantoj, evoluigo de rimedoj por subteni la plulernadon kaj enmovadiĝon de retaj lernantoj, malfermado de la kongreso (universalaj kaj regionaj), kaj plifortigo de eldonado kaj aliaj kontribuoj al la kultura, faka kaj scienca agado. La Estraro krome volas pliprofesiigi la serĉadon de subvencioj kaj donacoj por financi tiajn agadojn.

Grandan atenton ricevis la rilatoj kun TEJO. La junulara sekcio de UEA aktivis sukcese sur plej diversaj kampoj, i.a. por la unua Internacia Junulara Kongreso en Afriko, kaj jam komencis la kolektadon de junaj Amikoj de Esperanto laŭ nova senpaga membrokategorio en ĝia nova Statuto. UEA subtenas tiajn agadojn laŭ siaj povoj, i.a. per kontribuoj de oficistoj, volontuloj kaj estraranoj. Ne ĉio tamen iris glate en la kunlaboro inter TEJO kaj UEA, kaj la Estraro dediĉis preskaŭ plenan tagon de la kunsido pri konkretaj demandoj rilate al la utiligo de komunaj laborfortoj, laborlokoj, datumoj k.s. Tiuj restos temoj de daŭra inter-estrara konsiliĝo kaj kunlaboro.

Duona tago estas dediĉita al la UK en Seulo, kiu antaŭeniras laŭplane kaj senprobleme, malgraŭ lastatempaj politikaj streĉoj en la regiono. Aldone al riĉa kongresa programo, t.n. "pontkunveno" de diverslandaj esperantistoj diskutos en la parlamentejo pri la re-unuiĝo de la korea duoninsulo. Venis jam invitoj por la Universalaj Kongresoj en 2019 kaj 2020, kaj la Estraro antaŭvidas anonci la lokojn de tiuj kongresoj en Seulo. Preparoj por la venontjara kongreso en Lisbono progresas kontentige, kaj eblas jam nun sciigi la definitivajn datojn: 28 julio–4 aŭgusto, 2018.

[GK 682]

# Aŭtunaj Tagoj, Syyspäivät 9.–10.9.2017

## Eräkeskus Metsäkyläntie, Tammela

### PROGRAMO – OHJELMA

(ŝanĝoj eblas – *muutokset mahdollisia*)  
Transportoj el Forssa kaj reen kune per propraj aŭtoj.  
*Kuljetukset Forssasta ja takaisin kimppekyydein.*

#### VENDREDO / PERJANTAI 8.9.2017

**14.00** Esperantokurso por ripetantoj, gvidas *Sylvia Hämäläinen*. Vespere komuna manĝo kaj vesperumo. Loko: *Eräkeskus Metsäkouluntie*. *Esperantokurssi kertaajille, opettajana Sylvia Hämäläinen*. Iltaruonan jälkeen yhteistä illanviettoa.

#### SABATO / LAUANTAI 9.9.2017

**9.30–11.30** Alveno per publikaj busoj en Forssa kaj transportoj de tie al Eräkeskus Metsäkouluntie. *Saapuminen linja-autoilla Forssaan, josta kimppekyydit Eräkeskukseen*. Enloĝiĝo. *Majoittuminen*.

**12.00–13.00** Lunĉo. *Lounas (kotiruokaa)*

**13.00** Malfermo kaj prezentado de la ejo. *Päivien avaus ja Eräkeskuksen esittely*.

**13.30** Ekskurso vagado en la naturo de la najbara arbaro, ĉiu laŭ siaj fortoj. *Luontokävely läheisessä metsässä, kukin voimiensa mukaan*.

**15.00** Komuna ludado ekstere kun diversaj ludiloj (ekz. *mölkky*). Alternative: Saŭnajogo (aparta pago). *Perinnepelien pelaamista ulkona (mölkky ym.) Vaihtoehtoisesti: Saunajooga (erillinen maksu)*

**17.30** Vespermanĝo. *Iltaruoka*.

**19.00–21.00** Prelego Naturo – fonto de bona sano (Arja Kuhanen). Libera kunestado. Saŭno. *Arja Kuhasen luento. Mukavaa yhdessäoloa. Sauna*.

#### DIMANĈO / SUNNUNTAI 10.9.2017

**8.00–9.00** Matenmanĝo, *aamiainen*

**9.00** Ekveturo per propraj aŭtoj al la bieno *Korteniemi*. *Lähtö kimppekyydeillä Korteniemen perinnetilalle*.

**9.30–11.30** Konatiĝo kun la bieno, kun loka ĉiĉerono. *Opastettu kierros perinnetilalla*.

**11.30–13.30** Reen al Eräkeskus, tie lunĉo. *Pahuu Eräkeskukseen lounaalle*.

**13.30** Ekveturo per propraj aŭtoj al naturcentro *Hämeen luontokeskus*. *Lähtö kimppekyydeillä Hämeen luontokeskukseen*.

**14.00–14.30** Prezentado de la naturcentro. *Luontokeskuksen esittely*.

**14.30** Kafo kaj fermo de la Tagoj. Poste ebleco konatiĝi memstare pli en la naturcentro. Transportoj al Forssa laŭ interkonsento. *Kahvi ja päivien päätössanat. Luontokeskukseen voi vielä tutustua lisää omatoimisesti. Kimppekyydit Forssaan*.

Bonan hejmvojaĝon! *Hyvää kotimatkaa!*





Eräkeskus Metsäkyläntie, Tammela.

Fotoj: [www.metsakouluntie.com](http://www.metsakouluntie.com)

La bela regiono de *Häme* alvokas nin ĝui la Aŭtunajn Tagojn en la naturo. Ni tranoktos kaj aktivos vendrede-sabate en la naturarbara centro *Eräkeskus Metsäkouluntie* en la vilaĝo *Liesjärvi* kaj faros dimanĉe ekskursojn en lokajn muzean bienon kaj naturcentron. Vendrede eblos bone ripeti viajn lingvosociojn.

Venu jam vendrede al *Eräkeskus Metsäkouluntie* por partopreni ripetantan lingvokurson de Esperanto, kiun gvidas *Sylvia Hämäläinen*. Post la kurso okazos manĝo kaj vesperumo. La naturo ĉirkaŭas vin jam tiam kaj vi certe dormos bonege. Sabate post la matenmanĝo vi jam flue uzas la lingvon kaj pretas bonvenigi la alvenantojn.

Sabate post prezentado de la centro ni povas vagadi en la arbaro, ludi ekstere finnajn tradiciajn ludojn kaj eĉ provi saunajogon. Se vi ankoraŭ ne scias, kio estas *mölkky* kaj kiel ludi ĝin, nun vi lernos. Nature ĉiu partoprenos la ak-



## ALIĜILO

Mi aliĝas al la Aŭtunaj Tagoj de EAF  
9.–10.9.2017 en Tammela.



Nomo: \_\_\_\_\_

Adreso: \_\_\_\_\_

Tel./Ret-adreso: \_\_\_\_\_

**Aliĝkotizo** (enhavas transportojn kaj programojn):

25 € ĝis ..... 10.8.2017 \_\_\_\_\_

30 € post ..... 10.8.2017 \_\_\_\_\_

AT-paketo:

1-nokta (9.–10.9.) ..... 79 € \_\_\_\_\_

2-nokta (8.–10.9.) ..... 129 € \_\_\_\_\_

(ambaŭ enhavas tranoktojn en 2-litaj ĉambroj kaj manĝojn laŭ la programo)

Saunajogo sabate (laŭ antaŭrezervoj) 12 € \_\_\_\_\_

Transportoj Forssa–Eräkeskus Liesjärvi–Forssa kaj al Kortenieni/Naturcentro

Mi bezonas transporton (indiku tempojn): \_\_\_\_\_

Mi pretas transporti aliajn per mia aŭto: \_\_\_\_\_

**Entute pagenda al la konto de EAF:** \_\_\_\_\_

**Pagoj al la konto:**

**FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH**

Bv. uzi la AT-referencnumeron **4640** (ne skribu aliajn informojn en la pagilo).

**Pliaj informoj aŭ deziroj aŭ demandoj**, ekz. specialaj dietoj aŭ 1-lita ĉambro (vi povas demandi ankaŭ rekte de la kontaktuloj):

\_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

Bonvolu sendi la aliĝilon al:

Esperanto-Asocio de Finnlando

Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

Retaj aliĝoj tra [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi)

**BONVENON!**

# ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton  
syyspäiville 9.–10.9.2017 Tammelassa.

Nimi: \_\_\_\_\_

Osoite: \_\_\_\_\_

Puh./sähköposti: \_\_\_\_\_

**Ilmoittautumismaksu** (sis. kuljetukset ja ohjel-  
man):

25 €..... 10.8.2017 asti \_\_\_\_\_

30 €.....10.8.2017 jälkeen \_\_\_\_\_

AT-paketo:

1-yö (9.–10.9.) ..... 79 € \_\_\_\_\_

2-yötä (8.–10.9.) ..... 129 € \_\_\_\_\_

(kumpikin paketti sis. yöpymiset 2-hengen huo-  
neissa ja ohjelman mukaiset ruokailut)

Saunajogo lauant. .... 12 € \_\_\_\_\_

(etukäteistilausten mukaan)

Forssa–Eräkeskus/Museokierros–Forssa

kuljetukset:

Tarvitsen kuljetuksen (ilmoita ajat): \_\_\_\_\_

Voin kuljettaa muita autollani: \_\_\_\_\_

**Maksut yhteensä**

**Suomen Esperantoliiton tilille:** \_\_\_\_\_

**Tilinumero:**

**FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH**

Käytä viitenumeroa **4640** (ei muita tietoja viite-  
tai viestikenttään maksun yhteydessä).

**Lisätietoja, kysymyksiä ja/tai toivomuksia,**

esim. erikoisruokavaliot, 1 hh

(voit kysyä myös suoraan yhteyshenkilöiltä):

\_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

Lähetä lomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto

Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

tai tiedot sähköpostitse [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi)

**TERVETULOA!**

## Venontaj



**Korteniemi.**

**Foto: [www.luontoon.fi/korteniemi](http://www.luontoon.fi/korteniemi), Juhana Mattila.**

tivadojn laŭ siaj fortoj. Post la vespermanĝo ni aŭskultos prelegon de *Arja Kuhanen* (vidu apartan tekston). Eblas ankaŭ saŭni sen jogo. Agrabla kunestado finos la vesperon.

Dimanĉe ni ekskursos en la ĉirkaŭaĵo kaj konatiĝos kun la tradicia bieno *Perinnetila Korteniemi* kaj kun la naturcentro *Hämeen luontokeskus*. Ambaŭ estos prezentitaj de lokaj ĉiĉeronoj kaj ni aŭdos pri la vivo en la bieno kaj pri la naturo. Lunĉo estos tagmeze en *Eräkeskus Metsäkouluntie* kaj adiaŭa kafo en la naturcentro.

*Eräkeskus Metsäkouluntie* situas ĉ. 20 km for de la urbo *Forssa* kaj ne estas atingebla per publikaj transportiloj. Tial ni petas ke tiuj, kiuj venos per propraj aŭtoj, veturos tra *Forssa* kaj kunprenos aliajn de tie en la busstacidomo. Same necesas transportoj dimanĉe al la ekskursaj lokoj kaj reen al *Forssa*. EAF donos etan rekompencon al la ŝoforoj. Elkoran dankon jam antaŭe.

*Kaunis hämäläinen luonto kutsuu meitä nauttimaan liiton tämänvuotisista syyspäivistä. Paikana on Eräkeskus Metsäkouluntie, joka sijaitsee Liesjärven kansallispuiston vieressä ja Liesjärven rannalla. Paikka on aiemmin tunnettu Liesjärven metsäkouluna. Yöymme ja ruokailemme siellä.*

*Tule jo perjantaina Eräkeskukseen opiskelemaan ja kertaamaan esperanton taitojasi: Sylvia Hämäläinen vetää klo 14.00 alkaen kertauskurssin halukkaille. Näin saat hyvät valmiudet käyttämään kieltä seuraavana päivänä.*

*Lauantain ohjelmassa on luontokävelyä sekä perinnepelien pelaamista, nyt voit tutustua esim. mölkkyyhyn, jollet vielä tunne sitä. Tai sitten kokeilla saunajoogaa. Illallisen jälkeen Arja Kuhanen luennoi luonnon parantavasta vaikutuksesta (ks. tarkempi selostus alla). Sunnuntain retket suuntautuvat lähiseudulle, käymme sekä Perinnetila Korteniemessä että Hämeen luontokeskuksessa. Molemmissa on opastetut kierrokset suomeksi ja lisäksi mahdollisuus omatoimiseen tutustumiseen.*

*Eräkeskus Metsäkouluntie sijaitsee noin 20 km päässä Forssasta eikä sinne ole bussiyhteyttä. Siksi pyydämme, että autoilla tulevat kuljettavat muut kimpakyydeillä lauantaina eräkeskukseen sekä sunnuntaina vierailukohteisiin ja takaisin Forssaan. Liitto maksaa kuljettajille pienen korvauksen. Kiitos jo etukäteen. Kohteiden nettisivuilta saat halutessasi lisätietoa niistä: [www.metsakouluntie.com](http://www.metsakouluntie.com) (Eräkeskus Metsäkouluntie), [www.luontoon.fi/korteniemi](http://www.luontoon.fi/korteniemi) (Perinnetila Korteniemi) ja [www.luontoon.fi/hameenluontokeskus](http://www.luontoon.fi/hameenluontokeskus) (Hämeen luontokeskus).*

## Naturo – fonto de bona sano

La prelego de Arja Kuhanen traktos la temon el tute nova kaj ne-tradicia vidpunktoj. Ne temos pri ripozo kaj plifortigo de la psiko en naturo, ne pri korpa trejniĝo, ne pri efikoj de freŝa aero kaj eĉ ne pri utiligado de sanaj nutraj produktoj de la naturo. Estos prezentita la kunagado inter naturo kaj bakteriario kaj imuna sistemo de homa korpo. Estos montrita, kiel la perturbiĝinta rilato de homo al naturo povas provoki diversajn malsanojn.

*Arja Kuhanen kāsrittelee luontoa ja sen parantavaa vaikutusta aivan uudesta näkökulmasta. Luento on esperantonkielinen, mutta Arjalle voi toki tehdä kysymyksiä suomeksi.*

## Aliĝinformoj

Aliĝu tiel, ke vi sendos aŭ per poŝto la apudan aliĝilon al la oficejo de EAF aŭ retroŝte al la adreso [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi). Krome pagu la

koncernajn pagojn al la konto de EAF. Memoruzi referencnumeron sen indiki la temon de la pago. Notu, ke nura pago ne sufiĉas, ni atendas viajn informojn, prefere per retroŝto. Ĉi-foje tre gravas scii, kiam vi venos kaj ĉu vi pretas veturigi aliajn per via aŭto. Antaŭdankon!

Kun viaj eventualaj demandoj kaj deziroj, bonvolu turni vin al Paula Niinikorpi (manĝoj, ejoj, tranoktoj en Eräkeskus) aŭ al Tiina Oittinen (transportoj, ĝeneralajoj). De Arja Kuhanen vi povas demandi pri lokaj aferoj (distancoj, itineroj ktp). Pagojn sekvas la kasisto Tiina Kosunen. Ĉiuj estas funkciuloj de EAF kaj vi trovas la kontaktoinformojn sur la [page 2](#).

Pri la enhavo de la esperantokurso vi povas demandi de Sylvia Hämäläinen, kies informoj estas sur la [antaŭlasta paĝo](#).

## Ilmoittautumistiedot

*Ilmoittaudu lähettämällä oheinen lomake Suomen Esperantoliittoon tai samat tiedot sähköpostilla osoitteeseen [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi) sekä maksamalla vastaavat maksut liiton tilille. Muista käyttää viitenumeroa, jonka kanssa ei pidä kirjoittaa muita viite- tai viestitietoja. Huomaa, että pelkkä maksun lähettäminen ei riitä, sillä odotamme myös tietoja siitä, miten olet osallistumassa. Tällä kertaa toivomme erityisesti ilmoitusta siitä, milloin tulet ja voitko mahdollisesti kuljettaa muita autollasi. Ilmoitukset mieluiten sähköpostilla. Kiitos jo etukäteen!*

*Kysymyksiä ja/tai toivomuksia voit esittää liiton toimihenkilöille seuraavasti: Paula Niinikorpi (ruokailut, yöpymiset ja tilat Eräkeskuksessa), Tiina Oittinen (kuljetukset, yleiset asiat), Arja Kuhanen (paikalliset asiat) ja Tiina Kosunen (maksuasiat). Kaikkien yhteystiedot ovat lehden sivulla 2. Esperantokurssista saat tarkempia tietoja Sylvia Hämäläiseltä, jonka yhteystiedot ovat jäsenjärjestösivulla (lehden takakannen sisäsivu).*

Bonvenon! Tervetuloa!

*Estraro de EAF*

## La usonaninoj Wendy Heller kaj Esther Schor meritas atenton de ĉiuj esperantistoj tutmonde

Jam antaŭ proksimume tridek jaroj aperis la biografio de *Lidia Zamenhof* verkita de *Wendy Heller*. Tute nova kaj freŝa eldonaĵo estas *Bridge of Words* de *Esther Schor* publikigita ĉe la eldonejo *Metropolitan Books* en Novjorko. Ambaŭ estas skribitaj en la angla lingvo. Ĉiutage mi legas ilin fragmente. Kompreneble la teksto estas altira kaj havas kvazaŭ magian forton.

Kaj Heller kaj Schor kreas kun varma koro kaj neniuj sentema homo povas esti indiferenta. Abundas en la menciitaj verkoj gravaj faktoj. Multaj interesaj detaloj larĝigas komprenemon pri la teksto. Dum studado de ambaŭ libroj mi sentis ofte fortan emon mane aplaŭdi pro brilaj esencaj eroj.

Wendy kaj Lidia siatempe estis membroj en la *Bahai*-movado. Leganto facile konkludas tiun ligitcon kaj vidas en ĝi varmkoran bazon por prezentado de vivaventuraj detaloj. Ankoraŭ post tridek jaroj mia animo delikate vibras en la takto de la okazintaĵoj. Wendy Heller tre bele akompanas mian velksezonan itineron.

Tute freŝa estas la unika *Bridge of words*, kiu aperis 2016. Sanproblemoj kelkfoje semas tristajn erojn en mia eno, sed legado de *Ponto el vortoj* rapide lumigas mian animan pejzaĝon. La konata lingvisto el la Universitato de *Princeton* kapablas konsoli kaj kuraĝigi. Espereble ŝia ang-

lalingva verko iam aperos ankaŭ en Esperanto.

Dum jaroj la aŭtorinoj kolektis materialon. Tempo pasigita inter esperantistoj estis vere fekunda. Leganto mem facile vidas, kiel praktike la lingvo de Zamenhof funkcias. Abundas ekzemploj el la tuta mondo. Profesorino de la angla lingvo en Princeton liveris al ni gigantan manlibron pri Esperanto kaj la movado tutmonda.

Profesorino Schor uzis sep jarojn por kolekti materialon por sia libro. Ŝi vojaĝis inter esperantistoj ĉie en la mondo. Tiel la aŭtoro ricevis per propraj oreloj kaj okuloj sperton kiel bele kaj perfekte Esperanto funkcias inter diverslingvaj homoj. *Bridge of words* unikas kaj unuarangas. Mallonge dirite nia fama Princeton-profesorino produktis por ni taŭgan enciklopedion. Kun alta sangopremo mi legas la enhavon, tiel ekscita ĝi estas.

Al *Ionel Oneț* mi sendas varman dankon. Li rapidege poŝtigis al mi tiun diamantan libron rekte el la Libroservo de UEA en *Rotterdam*. Vi povas utiligi ankaŭ servojn de nia nova ĉefdelegito *Paula Niinikorpi* en *Pori*. Studentuziasmon kun gravaj verkoj mi deziras al la kursanoj somere 2017 en *Rauma*.

*Jorma Ahomäki,  
vicevizoro en Piispanristi ĉe Turku*



### Memprezento de Miamaria Saastamoinen, nova vicestrano de EAF

Mi estas *Miamaria Saastamoinen* el *Vantaa*, 29-jara esploris-todoktoro je komputiko en la Universitato de Helsinki. Estonte mi esperas labori en biblioteko. Lingvoj interesas min, kaj mi konatiĝis kun Esperanto kiam mia patro eklernis ĝin. Aliaj lingvoj kiujn mi studas estas ekzemple la germana kaj la greka. Mi amas ankaŭ baleton.

# La socia reto Amikumu lanĉiĝis

## De Jarlibro al "Horlibro"

En sabato, la 22-a de aprilo, lanĉiĝis nova socia reto, **Amikumu**. Ĝi estas uzebla per saĝtelefonoj kaj montras la cent plej proksimajn Esperanto-parolantojn, kiuj membras en ĝi.

## Jam pli ol tri mil aliĝintoj

Ene de unu semajno aliĝis jam pli ol tri mil homoj el certe almenaŭ kvindek landoj. En kelkaj grandaj urboj membras jam pli ol deko da Esperanto-parolantoj.

## Kontaktu la retan Esperantujojn – aliĝu al Amikumu!

Amikumu donas bonan eblecon por kontakti aliajn Esperanto-parolantojn – oni renkontiĝas unue en la reto kaj povas poste interkonsenti pri rendezuo eksterrete. Jen nova ebleco por trovi la enretajn Esperanto-parolantojn, kun kiuj ĝis nun ne tro facilis eksterreta kontakto.

Por ke tio funkciuu, necesas ke ankaŭ la homoj el la tradicia Esperanto-komunumo aliĝu al Amikumu kaj prezentu sin tie. Instrukcioj kiel fari troviĝas sur [amikumu.com](http://amikumu.com) kaj sube.

## De jarlibro al "horlibro"

En 1908 Hector Hodler lanĉis novan ideon – jarlibron, kiu faciligis trovi aliajn Esperanto-parolantojn. La nova ideo, kiun nun realigis *Chuck Smith* kaj *Evildea* kun sia teamo, 109 jarojn post Hodler, estas iusence nova versio de jarlibro. Sed tiun ĉi version ni povas nomi "horlibro" (se ne "minutolibro"), ĉar ĝi estas daŭre aktualigata.

Nun vojaĝanto povas kontakti ne nur la loku-



lojn en ilia hejmo, sed pere de Amikumu ankaŭ aliajn vojaĝantojn, kiuj hazarde troviĝas samloke. Kaj la lokulo povas vidi, kiu vizitas lian aŭ ŝian urbon.

## Artikoloj ĉe "Libera Folio" kaj "Ondo de Esperanto"

Unuajn impresojn pri la nova oferto vi povas legi ĉe *Libera Folio* ([www.liberafolio.org/2017/04/23/amikumu-rapide-ekhavis-pli-ol-mil-novajn-uzantojn](http://www.liberafolio.org/2017/04/23/amikumu-rapide-ekhavis-pli-ol-mil-novajn-uzantojn)), kun unua mondmapo de Amikumu-anoj kaj ĉe *Ondo de Esperanto* ([sezonoj.ru/2017/04/amikumu-4](http://sezonoj.ru/2017/04/amikumu-4)).

Kaj ne forgesu aliĝi al Amikumu por ke la tuta Esperantujo estu videbla – al novaj lernantoj, al konversaciemuloj kaj al la tuta mondo.

Konkrete: Iru per via saĝtelefono al la "vendejo" (fakte: distribuejo) de saĝtelefonaj aplikaĵoj ("apoj") kaj tie elŝutu la **senkoston** aplikaĵon.

Multan ĝojon kun viaj Esperanto-kontaktoj

*Lu Wunsch-Rolshoven  
EsperantoLand kaj GEA*

## Korespondpeto el Kuressaare

50-jara vira komencanto el *Kuressaare*, Estonio deziras korespondi kun finnaj viroj kaj virinoj. Kontakton oni trovas pere de samideanino *Virve Ernits*, kiu loĝas en Kuressaare, sur la insulo *Saaremaa* per retroŝto [virveernits@hotmail.ee](mailto:virveernits@hotmail.ee)

## Omaĝo al Raimo Tanskanen, dir. mus. – muzikisto, komponisto, pedagogo, estro de korusoj

*Raimo Tanskanen* naskiĝis en *Polvijärvi* 26.3.1937. Fininte la blindulleternejon en *Kuopio* li kune kun amikoj *Arvo Karvinen* kaj *Aatu Moilanen* vojaĝis suden al Helsinko por trovi sian lokon en la socio. Ili laboris tage, studadis vespere kaj kantis en diversaj okazaĵoj. Ekde la lernejaraj jaroj en la blindulleternejo ili kantis kune. En 1955 Raimo trapasis en la universitato de Helsinko la ekzamenon de hum. kand. kaj sekvan jaron en Sibelius-Akademio la ekzamenon de muzikinstruisto.

Ekde transloĝiĝo de la familio al *Pomark-*

*ku* en la komenco de la 80-aj jaroj, Raimo gvidis lokajn korusojn, instruis en pianludado kaj kantado, kaj semajnfine anstataŭis preĝejan kantiston/orgeniston.

Por Raimo la brajla skribo havis ege gravan signifon en laboro, studoj kaj hobiaj. Kiel profesia muzikisto brajlaj muziknotoj estis kondiĉo por lia sukcesa kariero. Ekde la tempo en Helsinko Raimo kopiis brajlajn muziknotojn.

Post la sukcesa venko en konkurso de komponaĵoj en 1970 li pli aktive komponis. Pluraj korusoj prezentas liajn kantojn.

### Koncerto honore al Raimo Tanskanen

En majo okazis en Helsinko la tradicia printempa koncerto de korusoj *Kontrapunkti* kaj *Karelia* sub gvido de dir. cant *Arto Joutsimäki*. Honore al Raimo la duono de la koncerto konsistis el liaj komponaĵoj. Bele sonis la kantado akompanita per piano, gitaro, trumpeto kaj tenorsaksofono. La koruso *Kontrapunkti* estis fondita 1975 kiel rezulto de muziktendaroj iniciataj de Raimo. Ankaŭ Raimo, Aatu kaj Arvo kantis en ĝi, nun nur Aatu.

Memore al la jubilea jaro, centjara sendependeco de Finnlando, la koncerto finiĝis per la solena Finlandia-himno de *Jean Sibelius*.

Raimo ne ĉestis la koncerton, sed geamikoj honoris lin en marto per provdisko de liaj komponaĵoj. En la fino de la kuranta jaro estos publikata disko de ĝis nun ne publikigitaj komponaĵoj de Raimo.

*Ritva Sabelli*

## UEA havas novajn oficejojn en Afriko

Sekve la malferman alvokon kiun UEA lanĉis en gazetaraj komunikoj N-ro 662 por tiuj esperantistoj loĝantaj en Afriko kiuj interesiĝas plenumi parton aŭ ĉiujn el la taskoj de Afrika Oficejo, venis 9 kandidatiĝoj ĝis la limdato. Post detala trarigardo de la kandidatiĝoj kaj konsideroj rilate al la buĝetaj limigoj, elektitaj kandidatoj estis intervjuitaj. Plurflankaj interkonsentoj kaj interparoloj pri eblaj disdividoj de la rimedoj gvidis al la decido malfondi la Afrikan Oficejon, kaj starigi oficejojn de UEA en

Lomeo (Togolando) kaj Lokossa (Benino), kaj sekve de tio uzi por ili la nomojn Lokossa Oficejo de UEA kaj Lomea Oficejo de UEA.

En tiuj du oficejoj laboros *Apéléké AGBO-LO* kaj *Adjévi ADJE* (Lomea Oficejo) kaj *Bernard GNANCADJA* (Lokossa Oficejo). Ili ne nur plenumos taskojn rilate al la Afrika agado, sed ankaŭ rilate al la ĝeneralaj agadoj de UEA.

*laŭ [GK 686]*

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperanto-lehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti [eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi).**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ✉ [www.esperanto.fi/helsinki\\_jukka.pietilainen@helsinki.fi](mailto:www.esperanto.fi/helsinki_jukka.pietilainen@helsinki.fi) (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kuappinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 ✉ [onni.kuappinen@gmail.com](mailto:onni.kuappinen@gmail.com)
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 044 953 4454 ✉ [kimmo.hannula@creavit.fi](mailto:kimmo.hannula@creavit.fi), [www.esperanto.fi/jyvaskyla](http://www.esperanto.fi/jyvaskyla)
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala ✉ [www.esperanto.fi/oulu\\_aini.esp@hotmail.com](http://www.esperanto.fi/oulu_aini.esp@hotmail.com)
- ♦ Esperantoseura Antaüen r.y. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere ✉ [ww.esperanto.fi/tampere](mailto:ww.esperanto.fi/tampere) (Tapani Aarne: [tapani.aarne@mbnet.fi](mailto:tapani.aarne@mbnet.fi)) ☎ 050 5245 823)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhankatu 26 A 11, 20100 Turku. ✉ [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi) ☎ 050 549 4709
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. ✉ [sylvia.h@kolumbus.fi](mailto:sylvia.h@kolumbus.fi) ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- ♦ Näkövammaisten esperantoyhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 ✉ [steleto@pp.inet.fi](mailto:steleto@pp.inet.fi)
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ✉ [fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 € tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 € sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 €. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). ✉ [bovoeo73@gmail.com](mailto:bovoeo73@gmail.com).

Esperanton harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla, Salossa ja Taivalkoskella.

Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta, ks. hallituksen yhteystiedot sivulla 2.

## ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna  
aperas dum la jaro

2017

Nro	Limdato	Aperas
4/2017	1.9.	en septembro
5/2017	15.11.	en decembro

### Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 €	1/1sivu/paĝo 50 €
1/2 sivu/paĝo 60 €	1/2 sivua/paĝo 30 €
1/4 sivu/paĝo 40 €	1/4 sivua/paĝo 20 €

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redakto:

[eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi) aŭ poŝte al la oficejo:  
Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65,  
00530 Helsinki.



Posti Green

## Esperanto-societo Antaŭen informas

- 04.09. je la 17.00 Septembra vespero
- 06.11. je la 17.00 Novembra vespero
- 13.09. je la 11.30 Esperanto-klubo de Antaŭen
- 20.11. je la 17.00 Elektokunveno
- 02.10. je la 17.00 Oktobra vespero
- 11.12. je la 17.00 Zamenhof-vespero

Iun estraron vi renkontas en *Nesto*, nia klubejo, ĉiujn lundojn je la 16–17

Someraj renkontiĝoj okazas en la kafejo de la ĉefbiblioteko ”Metso” en Tampere lunde je la 17–18 (ĝis la 28-a de aŭgusto). – Bonvenon!

*Estraro*

## Kelkaj eventoj viziteblaj ekster Finnlando

Dato	Aranĝo	Loko (Lando)	Kontakto
15.–23.7.	Somera Esperanto-Studado (SES) 2017	Banská Štiavnica (SK)	<a href="http://ses.ikso.net/2017">ses.ikso.net/2017</a>
6.–12.8.	1-a Inter-Fest	Bjelovar (HR)	<a href="http://esperanto-bjelovar.hr/festival/esperanto.html">esperanto-bjelovar.hr/festival/esperanto.html</a>
14.–20.8.	21-a Internacia Renkontiĝo de Pluezec	Pluezec (FR)	<a href="http://armor-esperanto.fr">armor-esperanto.fr</a>
30.9.–7.10.	25-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo	Tossa de Mar (ES)	<a href="http://kulturacentro.blogspot.com.es">kulturacentro.blogspot.com.es</a>

### Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy syyskuussa. Aineisto 1.9.2017 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en septembro. Artikoloj ĝis 1.9.2017 al la redakcio.. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <[eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi)>.